

Bulgara **ESPERANTISTO**



** Monda Asembleo de packonstruantoj	1
** Forpasis akademiano Todor Pavlov .	2
** Granda Literatura Konkurso	3
** Reprezentantoj de UEA vizitis Bulgari- on	3
** Distribuo de la taskoj inter la mem- broj de la Buroo de Centra Estraro de BEA	3
Ĉeestinto. Lazar Mladenov 70-jara . . .	4
Zora Oŝanska. Mia kara dua mondo . .	5
D-ro Georgi Popov. Esperanto en la hos- pitalo de Preslav	6
Kontrakto inter la E-societoj en Veliko Târnovo kaj Poltava	6
Dimitro Haĝiev. Lia nomo restos neforvi- ŝebla (35 jaroj ekde la penĉigo de Bo- tju Penev)	7
Boris Ĉolpanov. La granda popola kolero (700-jariĝo de la ribelo de Ivaĵlo) . .	10
Josif L. Portnoj. Malnova amiko de la bulgara popolo	11
Geoffrey Sulton. Intervjuo kun prof. Paul Ariste	14
S. Krajnov, Adrian Oates. Leteroj de amikoj	15
Petja Bobev. Fabelo pri la Najtingalo	16
** Pri la lingvoj en Bulgario	III
** Asen Grigorov en kartvela lingvo	III
** Proponu la plej konvenajn E-ekviva- lentojn !	III
** С есперанто в Полша и Унгария .	IV

Momento el la kunsido de la reprezen-
tanoj de UEA s-roj d-ro Victor Sadler
kaj Charles Power kaj la membroj de
LKK el Sofio (vd. p. 3)

Redakta Komitato :

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEK-
SIEVA, Marin BĀCEV, L'uba BOJAĜIEVA,
Dimitro DENĈEV, Ĥristo GOROV, Asen
GRIGOROV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju
KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.
Korektis : Vasja Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29



Juna esperantistoj-orkestran-
toj gastas al
la partoprenantoj de la ferio-seminario
en Velingrad (septembro 1976)

**MONDA ASEMBLEO DE PACKONSTRUANTOJ**

En Varsovio — la ĉefurbo de frata Pollando — dum la tagoj de 6-a ĝis 11-a de majo okazis Monda Asembleo de Packonstruantoj, organizita de la Monda Packonsilio kun la valora helpo de la Pola Packomitato. Venis 1500 delegitoj el 125 landoj kaj reprezentantoj de 50 internaciaj organizaĵoj kaj movadoj, inter kiuj ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Oni povas plene konsenti kun la karakterizo, farita de Romeŝ Ĉandra (Romesch Chandra), prezidanto de la Monda Packonsilio, ke Varsovio estas tre trafa loko por simila evento, kia estis la Asembleo. Ĝi estas simbolo de barbaraj ruinigoj, kiujn faris kaj povas fari la adeptoj de faŝismo, rasismo kaj agreso. Varsovio tamen estas ankaŭ simbolo de renaskiĝo. Tial, komparante la detruitan Varsovion, kiun oni vidis en dokumenta filmo, kun la hodiaŭa belulino Varsovio, oni povas ne nur rememori la pasintecon, sed ankaŭ jeti rigardon al la estonteco — estonteco, en kiu oni povas konstrui novan kaj daŭran pacon.

La delegitoj havis je dispono diversajn formojn por trakti la problemojn de konstruado de daŭra kaj justa paco. En multnombraj kunsidoj de la pleno, de la dek komisionoj, de vico da forumoj kaj rondaj tabloj kaj en kontinentaj renkontiĝoj ĉiu povis laŭdezire preni la parolon kaj esprimi sian starpunkton rilate la tagordon. Tiu formo de dialogo inter homoj kun plej diversaj ideologiaj, filozofiaj, religiaj, politikaj k. a. konceptoj prezengtis bonegan kampon, sur kiu oni analizis ĉiuflanke la plej gravajn problemojn de nia hodiaŭa mondo — mondo, kiu posedas armilojn por dekfoje neniigi nian planedon kaj fari el ĝi sinistran dezerton. Malgraŭ kaj eĉ nome pro tio, ke oni povis el diversaj starpunktoj trakti la manieron por konservi la pacon kaj la homan civilizacion, oni venis al unuanimaj konkludoj, kiuj unuigas la pacbatalantojn kaj kreas en ili la esperon, ke tamen ekzistas realaj eblecoj ligi la manojn de la militfajrigantoj, krei mondon sen armiloj, sen militoj.

La delegitoj estis precipe homoj kun granda socia kaj politika sperto kaj ne suferis de naiveco. Ili tre prudente analizis la faktojn de la internacia situacio kaj la krimajn agojn de la granda armilkomerco, la propagandan blufon de la militista kaj reakcia gazetaro, radio kaj televido.

Oni montris per faktoj en mano la hipokritecon de tiuj, kiuj krias pri «soveta minaco», pri «manko de garantioj pri la homaj rajtoj en la socialismaj landoj» ktp, senmaskigante la imperiistajn rondojn, kiuj tiamaniere deziras kaŝi la malbelan realaĵon en siaj propraj landoj kaj en la landoj, kie ili senkontrole regas. Tiu kritiko estis tiel argumentita kaj nerefutebla, ke la guidantoj de la samtempe kunsidanta londona sesio de NATO devis fari deklarojn, ke ili estas pretaj al «konstrua dialogo» kun «Oriento», t. e. kun la socialismaj landoj. Tamen la praktikaj agoj de NATO, kies sesio prenis decidojn pri plialtigo de la elspezoj por novaj, pli detruaj armiloj,



ilustras la grandegan diferencon inter la falsaj paroloj kaj la faktaj agoj de la militistaj rondoj. Tial la pacdefandantoj ne endormigas sin per similaj deklaroj, sed vigle staras je sia posteno serve al la plej noblaj idealoj de la popoloj kaj de la tuta homaro.

La Asembleo insistis pri tuteca plenumo de la decidoj de Helsinkia Konferenco pri Tuteŭropa Sekureco kaj Kunlaborado, ne deŝirante artifice parteton de la kultura kunlaborado disde la ceteraj partoj pri politika kaj ekonomia kunlaborado. Ĉiuj pozicioj en la Fina Akto de Helsinki estas logike ligitaj inter si, kaj la eŭropaj registaroj devas strikte plenumadi ĉiujn kiel unu tuton. La krioj de la usona prezidento Carter (Kartâr) pri «defendo de la homaj rajtoj» nur kaŝas la fakton pri kreskigo de la militelspezoj de Usono al pli ol 130 miliardoj da dolaroj jare. Ĉu tiamaniere oni devas defendi la homajn rajtojn — organizante militajn intervenojn en fremdajn landojn (Proksima Oriento, Suda Afriko ka.)?

La esperantistaro el sia maldolĉa sperto bone konas la malbonajn rezultojn de la militoj por la normala evoluo kaj progreso de la movado por Lingvo Internacia. Tial la delegitaro de MEM aktive partoprenis ĉiujn formojn de agado de la Asembleo kaj faris sian kontribuon al la komuna pacafero. Rezulte MEM havas jam du membrojn en la Monda Packonsilio: la nova estas nia pacamiko William Gilbert — ĝenerala sekretario de MEM.

Al energiaj pacaktivecoj, geesperantistoj!

FORPISIS AKADEMIANO TODOR PAVLOV



la plej elstaraj politikaj, kulturaj kaj sociaj agantoj kaj konstruantoj de nova socialisma Bulgario, mondfama bulgara sciencisto. Li estis koloso sur la ideologia fronto kaj senlaca batalanto por la afero de la laborista klaso, arda patrioto de nia patrolando, aktiva kaj konsekvenca laboranto por florado de la eterna bulgara-soveta amikeco, dediĉinta sian tutan vivon al la triumfo de la grandaj ideoj de marksismo-leninismo, al la proleta internaciismo, al la paco, al la demokratio kaj socialismo. La multnombraj verkoj de T. Pavlov pri dialektika kaj historia materialismo, pri estetiko, pedagogio, sociologio, filozofiaj problemoj de fakaj sciencoj k.a. estas modelo de konsekvenca krea marksisma-leninisma traktado. Lia ĉefverko estas la monumenteca libro „Teorio de la reflektio“.

Pro siaj grandegaj sciencaj atingoj Todor Pavlov estas elektita kiel aktuala membro de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio kaj honora membro aŭ koresponda membro de preskaŭ ĉiuj akademioj kaj pli grandaj universitatoj en la socialismaj landoj.

Li estas portanto de du ordenoj „Lenin“ kaj de la ora medalo de la Akademio de Sciencoj de USSR „Karl Marks“.

En nia lando T. Pavlov estas honorita per multaj plej altaj titoloj. Li estas Heroo de Popola Respubliko Bulgario, dufoje Heroo de la Socialisma Laboro, portanto de kvin ordenoj „Aganto de Scienco kaj Kulturo“.

Todor Pavlov estis granda amiko de Espe-

(Sekvas sur p. 3)

La 8-an de majo post longa malsanado forpasis en sia 87-jara aĝo akad. Todor Pavlov — membro de CK de BKP, honora prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, direktoro de la Instituto de Filozofio de la Bulgara Akademio de Sciencoj, deputito, sindone fidela filo de BKP kaj la bulgara popolo, unu el



GRANDA LITERATURA KONKURSO

Lige kun la 100-a datreveno de la Liberigo de Bulgario el la otomana kvinjarcenta jago «Bulgara Esperantisto» anoncas grandan literaturan konkurson. En ĝi povas partopreni ĉiu esperantisto — bulgara aŭ eksterlanda — per originalaj verkoj (poezio, rakontoj, eseoj) kaj per tradukita poezio. La verkoj devas esti ligitaj kun la Liberigo, kun la bulgara-rusa kaj bulgara-soveta amikeco, kun la nova libera vivo de nia popolo.

Limtempo por prezento de la konkursaĵoj: **la 30 de decembro 1977!**

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj aperos en «Bulgara Esperantisto».

La maŝine tajpitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro kaj ties ĝusta adreso. La konkursaĵojn kaj la fermitan koverton oni metu en pli grandan koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo, kaj ĉion sendu rekomendite je adreso: „**Bulgara Esperantisto**“, **bul. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario** (por la konkurso).

REPREZENTANTOJ DE UEA VIZITIS BULGARION

La nova konstanta kongresa sekretario (KKS) s-ro Charles Power (Ĉarlz Pauer), kaj la direktoro de la Centra Oficejo de UEA d-ro Victor Sadler vizitis nian landon fine de aprilo.

En Sofio okazis la unua kunsido de la membroj de LKK el Sofio. Es'is traktitaj multaj demandoj lige kun la preparo kaj okazigo de la 63-a UK de Esperanto en Varna en 1978 j. Kun la sama celo okazis renkontiĝoj de d-ro Sadler kaj Power kun gvidantoj de „Balkanturist“ kaj turista agentejo „Pirin“, en kiuj oni ĝustigis la kondiĉojn por la ekskursoj kaj ripozoj de la kongresanoj.

Post tio la gastoj, akompanate de Nikola Aleksiev — prezidanto de LKK, forveturis al Varna, kie ili kunŝidis kun la membroj de LKK el Varna. Oni trarigardis la kongresejon, diversajn hotelojn, komunloĝejojn ka. Okazis ankaŭ renkontiĝo kun la prezidanto de la Urba Popola Soveto ing. St. Jonev, kiu promesis plenan subtenon al la Kongreso.

Ch. Power, N. Aleksiev kaj Dimitro Papazov — prezidanto de Bulgara E-Junularo, vizitis ankaŭ Veliko Tŕrnovo por konatiĝi kun la kondiĉoj por la kongreso de TEJO en 1978 j.

Tiuj ĉi vizitoj estis tre utilaj, serioza paŝo en la praktika preparo de ĉiuj kondiĉoj por okazigo de ambaŭ kongresoj de la esperantistoj el la tuta mondo. Ni ne dubas, ke ili donos fortan puŝon por la plua konkreta preparlaboro, por ke niaj amikoj el ĉiuj kontinentoj konstatu, ke iliaj bulgaraj dommastroj estas vere gastamaj.

ranto. Li lernis la lingvon en la malliberejo kaj poste per sia granda aŭtoritato ĉiam subtenis la laboron de la esperantistoj. La morto lin trafis kiel membron de la Honora Komitato de 63-a UK de Esperanto.

DISTRIBUO DE LA TASKOJ INTER LA MEMBROJ DE LA BUROO DE CENTRA ESTRARO DE BEA

Prezidanto kaj estrarano pri planado kaj financoj — **Ĥristo Gorov**

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturkleriga agado — **Nano Kiuĉukov**

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado — **Petro Todorov**

Sekretario kaj estrarano pri instruado, UEA kaj «Bulgara Esperantisto» — **Kunĉo Vălev**

Sekretario kaj estrarano pri organizaj demandoj kaj informado — **Krăstju Karucin**

Sekretario kaj estrarano pri junularaj aferoj — **Angel Todorov**

Estrarano pri eksteraj rilatoj kaj MEM — **Nikola Aleksiev**

Estrarano pri eldonado kaj «Paco» — **Violin Oljanov**

Estrarano pri Bulgara Esperantista Kooperativo — **Stojan Kostadinov**

Estrarano pri turismo kaj filatelo — **Bojdar Leonov**

Estrarano pri Bulgara Esperanto-Junularo kaj TEJO — **Dimitro Papazov**

La 19-an de aprilo la Sofia esperantistaro celebris la 70-ariĝon de nia Esperanto-ve-



rano Lazar Mladenov. Pri lia vivo kaj agado parolis k-doĵ Manol Jordanov kaj Nikola Aleksiev. La publiko konatiĝis kun la riĉa kaj ins'rua biografio de unu el la tre modestaj, sed ĉiam fidelaj kaj agemaj membroj de E-societo „Maksim Gorkij“.

Lazar Mladenov naskiĝis antaŭ 70 jaroj en v. Ljalinci, proksime de urbo Trân, en multmembra malriĉa vilaĝana familio. Lia infaneco koincidas kun la periodo de la militoj (1912—1918 j.), kio igis ĝin ankoraŭ pli malfacila. Fundamentan lernejon Lazar finis en la proksima urbo Trân, laborante samtempe kiel gazetvendisto, servisto ĉe riĉaj civilanoj, en kafejo kaj por gajni sian panon. Jam junulo li konatiĝis kun progresemaj junuloj kaj varme brakumis la batalon kontraŭ la sociaj mal-

justecoj. Ne havante monon kaj laboron en Trân, sed kun arda deziro lerni plu, Lazar venis Sofion. Tage li laboris kiel masonisto, vespere vizitis gimnasiajn kursojn. Sed pro nesufiĉo de monrimedoj post nelonge li ĉesigis la studadon kaj eklaboris en presejo.

Grandan aktivecon montris la juna preslaboristo en la vicoj de la progresema junularo ĉe la popola legejo (kulturdomo) „Hristo Botev“ en Sofio. Li estas unu el la fondintoj de legejo ankaŭ en sia naskiĝvilaĝo, kontribuinto por la akvoprovizo kaj la elektrecigo de la vilaĝo, por fondo de kooperativo ka.

Apar teviglan agadon li disvolvi en la vico de la abstinula movado, tre populara en nia lando, kies adeptoj sindone batalis por sobereco, kulturo kaj nova, pli feliĉa sociordo. Li longe aktivis kiel prezidanto de abstinula societo, membro de la centra gvidorgano de la Junulara Abstinula Neŭtrala Unuiĝo, re'aktoro de ties organo „Sobra Junularo“ ka. Li estis aŭtoro de multaj polemikaj kaj kritikaj artikoloj kaj raportaĵoj, ŝatata preleganto kaj raportanto en kunvenoj, konferencoj, renkontiĝoj en la tuta lando.

Kun Esperanto Lazar Mladenov konatiĝis tuj post sia veno al Sofio. Li aktive laboris en la Sofia E-societo kaj baldaŭ fariĝis ĝia estrarano.

Dum la jaroj de streĉa batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo li ankaŭ donis sian kontribuon.

Poŝt la popola venko Lazar Mladenov same estis sindona sociaganto, laborante en la abstinula kaj esperantista movadoj, en la Patrolanda Fronto ka.

Aparte notindan aktivecon disvolvis Lazar Mladenov dum la kampanjo por kolektado de rimedoj por konstruo de propra E-domo. Li vendis pli ol 4000 de la specialaj markobrikoj — kvanto, kiun neniu en la lando dis-

Esperanto estas tiel simpligita kaj facila por studado, ke eĉ laboristoj, ne regantaj alian lingvon, dum kelkaj monatoj per nur kelkhora lernado atingas tiom, kiom ili ne atingus ĉe «la vivaj lingvoj» dum tutaj jaroj.

Okazis tiel, ke la novelon de Elin Pelin «Geraci» mi ne estis leginta en originalo kaj unuafoje mi tralegis ĝin en Esperantlingva traduko. Eble mi esprimus min tre forte, sed preskaŭ nenio el la estetika valoro de tiu bona verko de nia talenta iama beletristo perdiĝis ĉe la traduko, kaj mi englutis la libron kvazaŭ ĝi estis la originalo mem. Por mi tio definitive solvis la demandon: se Esperanto povas prezenti tiajn verkojn kiel «Geraci» ne mortidante ilin (poste mi tralegis bonajn tradukojn ankaŭ de Botev kaj Smirnen-ski), tio signifas, ke ĝi ne estas morta lingvo, ke ĝi vivas kaj devas vivi, des pli ke ĝi estas tiel facila por lernado.

Akad. TODOR PAVLOV



vendis. Multjare li laboris ankaŭ por la stabiligo de Bulgara Esperantista Kooperativo, estante membro de ĝiaj gvidorganoj, estro de la eksa presejo „Esperanto“ ka. Lia nomo estas nedisigeble ligita kun la konstruo de montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa. Li estis sekretario de ĝia konstrukomitato kaj dediĉis sian tutan energion, obs'ion kaj organizan talenton al la nobla tasko.

Pro sia E-laboro Lazar Mladenov estis honorita per la ora insigno de BEA.

Post la paroloj de k-doj M. Jordanov kaj N. Aleksiev k-do L. Mladenov estis salutita en la nomo de CK de BEA, de reprezentantoj de multaj sofiaj E-societoj kaj de BEK. Ame salutis lin ankaŭ liaj du malgrandaj nepoj Petjo kaj Saŝko. Oni enmanigis al li memordonacojn kaj florojn. La jubileulo dankis al la salutoj per kortuŝaj vortoj.

Ni devas noti, ke jubilea celebro de L. Mladenov okazis ankaŭ en legejo „Hristo Botev“, kie vasta publiko kaj aktivuloj el diversaj sociorganizaĵoj esprimis rekonon kaj dankon al li pro lia pli ol 50-jara abnegacia idealisma laboro kaj batalo por popola bonstato kaj progreso, por paco kaj socialismo.

Niaj aktivuloj

MIA KARA DUA MONDO

Mi eksentis ĝin, kiam mi eniris en la organizan vivon de nia E-movado. Proksimume



antaŭ kvardek jaroj mi komencis lerni Esperanton sola. En 1936 j. mi partoprenis en kurso de nia estimata E-veterano Asen Grigorov kaj kantis en la sofia esperantista horo, gvidata de Uzunĝaliev.

Kulturkunvenoj

Pazarĝik. Lige kun la 60-jariĝo post la morto de d-ro Zamenhof okazis kunveno de 60 esperantistoj el Pazarĝik kaj v. Momina Klisura. Pri la vivo kaj agado de nia Majstro parolis Petko Arnaudov. Kelkaj societanoj rakontis interesajn okazaĵojn el la esperantista vivo. Sekvis belarta programo.

R. Georgieva

Kazanlâk. Subĉielan kunvenon en la apudurba parko Tjulbeto partoprenis ĉ. 30 geesperantistoj el ĉiuj aĝoj. Sv. Damjanova tralegis la referaĵon „La morala aspekto de la esperantisto“, senditan de CE de BEA. Okazis vigla diskutado.

Post la referaĵo oni faris kolektivan promenadon.

K. Ĉindin

Salutu E-societon jubileulon!

Ĉi-jare E-societo „Leono“ en Momina Klisura celebros sian 10-jaran jubileon. Oni povas sendi salutojn je adreso: Esperanto-societo „Leono“, 4468 Momina Klisura, Bulgario.

Sed la jaroj estis pezaj por mi. Mia edzo Todor longe estis sen laboro, sen rimedoj. Tre ofte ni translokiĝis de urbo al urbo serĉante laboron kaj pli bonajn vivkondiĉojn.

Post la liberiĝo el sub la kapitalisma kaj faŝisma jugo en 1944 j. ni entuziasme eklaboris por konstruado de socialismo en nia kara patrolando. Por Esperanto la tempo ne sufiĉis, kaj mia sistema laboro kiel esperantistino komencis postresti. Tamen la popola proverbo prave diras, ke neniam estas malfrue ekagi. Unue mi komencis sola refreŝigi miajn lingvo-konojn, poste serioze laboris en la kursoj de k-do Kunĉo Vâlev en la Sofia Universitato. Jam ses jarojn mi regule vizitas la kunvenojn de E-societo „M. Gorkij“ en Sofio, kie mi membras.

Ekde du jaroj mi aktivas kiel kasistino de nia societo. En ĝia estraro mi laboras kune kun nia ŝatata prezidanto Jvan Keremidĉiev, la amata E-aktorino Belka Beleva — vicprezidentino, kaj aliaj bonaj geamikoj.

Grava parto de mia E-agado estas mia eksterlanda korespondado. Ĉirkaŭ dekkvin amikoj el Sovetunio, Francio, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario. Pollando regule skribas al mi, kaj mi al ili. Preskaŭ ĉiujn mi konas persone. Ni interŝanĝas leterojn, esperantaĵojn, insignojn. Al ili mi rakontas pri nia E-agado, pri nia heroa pasinteco, pri la popolaj tra-

dicioj kaj niaj sukcesoj en la konstruado de socialismo. Per bildkartoj, prospektoj kaj fotoj mi konvinke pruvas ĉion diratan.

Multaj el miaj eksterlandaj amikoj jam gastis ĉe mi, la ceteraj ankaŭ promesas veni en Bulgarijon. Ili planas viziti la Universalan Kongreson de Esperanto en Varna en 1978 j. kaj estos ankaŭ miaj gastoj. Ekde nun mi senpacience atendas niajn renkontiĝojn. Per amikaj leteroj ili ege ĝojigas min. Nun mi salutos varme miajn sovetajn geamikojn lige kun la 60-jariĝo de la Granda Oktobro.

Ĉio ĉi estas vera ĝojo por mi. Ĝi faras mian vivon pli riĉa, pli interesa, pli sencoplena. Aktive labori por la disvastigo de nia kara lingvo Esperanto, por la sukceso de nia E-movado, doni mian modestan kontribuon en la komuna batalo por la triumfo de paco kaj amikeco inter la popoloj — tio por mi estas feliĉo.

Zora Oŝanska

ESPERANTO EN LA HOSPITALO DE PRESLAV

Antaŭ 3 jaroj en urbo Preslav estis fondita E-societo „Ora Epoko“. Unuagradan rolon por la organizo kaj funkciado de la so-

cietoj ludis k-dino Rajna Stanĉeva. Ŝi ankaŭ estis la unua kursgvidantino en la urbo. En la unua kurso partoprenis kelkaj kuracistoj kaj flegistinoj, kiuj sukcese finis ĝin kaj faris ekzamenon. La ĉefkuracisto de la kirurgia fako d-ro Marĉev komencis lerni sola, sed obstine kaj diligente. Post la tria monato li jam libere parolis en Esperanto. Nun en la kirurgia kabineto de nia hospitalo du kirurgoj — d-ro Marĉev kaj d-ro Popov — kaj la flegistino Petrova ĉiam parolas inter si esperantlingve. Kiam ili vizitas malsanulojn, de tempo al tempo ili interŝanĝas po kelkaj vortoj en Esperanto pri aferoj, kiujn la malsanuloj ne devas scii.

En la interna kaj rentgena fako ankaŭ laboras esperantistoj-kuracistoj: d-ro Vitanov, d-ro Radeva, d-ro Piperov.

Jam ĉu jarojn ĉiuj kuracistoj-esperantistoj estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ kaj „Medicinistaj Informoj“ (eldonata de Ĉeĥa E-Asocio).

Ĉi-somere de la 13 ĝis la 17 de julio kelkaj kuracistoj, flegistinoj kaj gelaborantoj partoprenos internacian medicinistan E-konferencon en Krakov.

D-ro Georgi Popov

K O N T R A K T O

Tiu ĉi kontrakto estas subskribita inter Esperanto-Societo „Lumo“ en u. Veliko Târnovo (Bulgara Popola Respubliko) kaj Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco en Poltava (Ukraina Soveta Socialisma Respubliko) pri amikecaj rilatoj kaj kunlaboro.

La kontrakto celas:

a) Profundigi la amikecajn rilatojn inter niaj ĝemelaj urboj Veliko Târnovo kaj Poltava.

b) Ebligi al niaj membroj interŝanĝi spertojn pri la Esperanto-movado en niaj landoj kaj urboj.

Por efektiviĝi ĉi tiujn celojn ni antaŭvidas:

a) Interŝanĝi regule niajn laborplanojn, korespondaĵojn pri la laboro de niaj societoj kaj pri interesaj eventoj en ili.

b) Interŝanĝi salutkartojn inter niaj societoj okaze de politikaj kaj kulturaj festotagoj:

por Veliko Târnovo — la 1-a de januaro, la 8-a de marto, la 1-a de majo, la 24-a de majo, la 9-a de septembro, la 15-a de decembro;

por Poltava — la 1-a de januaro, la 8-a de marto, la 1-a de majo, la 9-a de majo, la 12-a de julio (fondiĝo de la urbo), la 23-a de septembro (liberiĝo de la faŝismo), la 7-a de novembro, la 15-a de decembro.

c) Interŝanĝi E-gazetojn kaj E-literaturon, kiuj aperos en niaj landoj.

ĉ) Interŝanĝi fotojn kaj bildkartojn pri gravaj aranĝoj kaj eventoj en la vivo de niaj societoj kaj ankaŭ pri urbaj politikaj kaj kulturaj eventoj.

d) Aranĝi ĉiujare klubvesperojn pri niaj ĝemelaj urboj. Lige kun tio ĉi oni interŝanĝu materialojn por unu numero de murgazeto (skribaĵojn sur tri tajpitaj paĝoj kaj almenaŭ kvin fotojn).

e) Propagandi la E-ideojn inter la civitanoj de ambaŭ urboj kaj varbi novajn adeptojn de Esperanto.

Tiu ĉi kontrakto estas subskribita por du jaroj kaj validas ekde la 1-a de majo 1977.

*En la nomo de Esperanto-Societo
«Lumo» en Veliko Târnovo:*

NIKOLA NAJDENOV

*En la nomo de Poltava Urba
E-Klubo de Internacia Amikeco:*

VASILIJ GRIGORENKO





„La vivo preterpasos kaj forviŝos nin, se ni donis nenion de nia juneco por la socio.“ Tiujn ĉi vortojn diris



Botju Penev Genĉev en sia artikolo „Pri la junularo“.¹ Kaj li ne nur donis ion de sia juneco al la socio, sed li oferis la plej karan — sian, apenaŭ dudekdujaran vivon — en la batalo kontraŭ la faŝismo, por la triumfo de la socialismo.

Li naskiĝis je la 29 de marto 1920 en la malgranda vilaĝo Katranĝii, nuna distrikto de Gabrovo. Lia patro estis masonisto, la patrino — servistino en la vilaĝa lernejo. Li elkreskis en malriĉeco. Fininte la fundamentan lernejon li havis grandan deziron daŭrigi sian studadon en gimnazio, tamen mankis rimedoj por tio. Tial Botju eklaboris kiel konstrulaboristo. En

1936 j. li enskribiĝis en la neplenan gimnazion de Drjanovo. Ne havante monon por lui loĝejon en la urbo, li devis du jarojn trapasi ĉiun tagon piede ire kaj revene la distancon de 8 kilometroj de sia vilaĝo ĝis Drjanovo. Tamen tio ne malhelpis al li esti unu el la plej bonaj lernantoj en la klaso. Tie li manifestis sin kiel tre kapabla, laborema, sciama, modesta, ĝentila, kontaktema kaj ekstreme honesta junulo, kiu forte amis sian laborpopolon. Oni povas miri, kiel juna homo, elkreskinta en tiaj malfavoraj kondiĉoj, povas formiĝi kiel tiom perfekta personeco. Pro siaj kvalitoj Botju ĝuis la amon kaj la simpatian de ĉiuj kunlernantoj kaj instruistoj.

Jam dum la unuaj jaroj de sia studado en la gimnazio li montris grandajn mensajn kapablojn, ferozan logikon kaj riĉan erudicion. Jam tiam li komencis okupi sin pri la problemoj de la vivo. En la lernejo Botju pleje interesiĝis pri filozofio, sociologio kaj literaturo, sed estis ankaŭ bona matematikisto kaj tre facile ekposedis fremdajn lingvojn. Dotita per muzika talento, li kiel knabo en sia naskiĝvilaĝo ellernis la scipopon ludi je ĝadulka² kaj en la gimnazio dum nur unu lernojaro ekregis ankaŭ violonon kaj komencis ludi en la ĝelernanta orkestro. Li neniam disiĝis de sia violono kaj tre ŝatis ludi kaj kanti popularajn kantojn kaj dancojn. En Drjanovo Botju ellernis la stenografion kaj uzis ĝin por stenografi la lecionojn, kio treege helpis lin. Por kompletigi lian portreton mi devas aldoni, ke Botju Penev estis tute harmonie formiĝinta persono. Al la noblaj traj-

¹ Vd. ĵ. „Lăcistrui“, eldonaĵo de la knaba gimnazio de Veliko Târnovo, n-roj 2 kaj 4, 1940—41 j.

² Ĝadulka — bulgara nacia korda muzikinstrumento.

toj de lia karaktero kaj personeco korespondis korpa beleco. Li estis mezstatura, svelta junulo kun bela ronda vizaĝo kaj saĝaj kaŝtankoloraj okuloj kun radiantaj rideto. Kvankam malriĉa, li vestadis sin kun bona gusto. Neniam li hontis pri sia malriĉeco kaj neniam plendis pri kio ajn. Botju Penev estis abstinulo kaj ĉiam arde propagandis la ideojn de la abstineco, kiuj tiutempe estis tre popularaj inter la progresema junularo de nia lando. Li ankaŭ forte amis la naturon, en kiu li sentis sin feliĉa.

Mi persone konatiĝis kun Botju en la komenco de lernojaro 1937—38, kiam el Sevlievo mi transiĝis en la gimnazion de Drjanovo. Tre rapide li, Neno Janev (la nuna prezidanto de DE de BEA en Gabrovo) kaj mi interamiĝis kaj formis nedisigeblan triopon. Ni, la tri, ankaŭ samtempe fariĝis esperantistoj. Tio okazis tute hazarde. En februaro 1938 interparolante kun nia instruisto de muziko kaj stenografio Haĝivanov, ni eksciis pri Esperanto. Jam la sekvan tagon ni havigis al ni lernolibrojn kaj komencis lerni kun granda ardo kaj fervoro. Estante samklasanoj ni uzis ĉiun interlecionan paŭzon por konversacii en Esperanto. Tiamaniere ni tre rapide ekposedis la fundamentojn de la lingvo kaj jam en la fino de la lernojaro ni povis sufiĉe bone uzi ĝin skribi kaj paroli. Botju komencis korespondi kun Alice Vabi el Tallinn, Estonio, tiam lernantino en komerca gimnazio.

La sekvan jaron Botju Penev translokiĝis kiel lernanto en u. Veliko Târnovo. Por povi daŭrigi sian studadon li fariĝis kelnero en restoracio nur kontraŭ la manĝaĵo kaj preparadis siajn lecionojn ĝis malfrua nokto ĉe kandellumo en ruinigita loĝejo. Dum la somerferioj li laboris kiel konstrulaboristo en Sofio. La vivo mem preparis lian homaman naturon akcepti sindone la noblan idealon de la komunismo, li varme brakumis ĝin kaj ĵetis sin entuziasme en la batalon por pli bela estonteco. Botju rapide

elkreskis kiel gvidanto de RMS³ kaj ligis nedisigeble sian sorton kun la revolucia junulara movado. Suferinte fortan baton, la RMS-organizaĵo en la gimnazio estis restarigita en 1939-40 j. Botju eniris ĝian nelegan estraron. Dum nelonga periodo li fariĝis unu el la plej elstaraj propagandantoj de la komunismaj ideoj kaj plej aktiva RMS-organizanto en la gimnazio. En 1940—1941 j. li jam estigis gvidanto de la tuta organizaĵo. Estante tre bona lernanto, li ĝuis altan aŭtoritaton kaj inter siaj kamaradoj, kaj inter la instruistoj. Tio helpis lin pli facile unuigi la kolektivon kaj gvidi lerte la organizaĵon, sen elvoki suspekton de la policagentoj.

Botju estis en la centro de kelkaj amasorganizaĵoj en la gimnazio, unuigantaj la progreseman junularon. Li estis prezidanto de E-societo „Flamo“, gvidanto de E-kursoj por progresintoj en la knaba gimnazio kaj de kurso por komencantoj en la knabina gimnazio. Subtenante korespondkontaktojn kun esperantistoj el diversaj landoj, li per Esperanto edukis la junularon en spirito de proleta internaciismo. Botju estis prezidanto ankaŭ de la stenografa societo „Viĥar“ kaj gvidis kursojn de stenografio, li direktadis la atenton de la kursanoj al la malperfektaĵoj de la kapitalisma sociordo kaj montradis samtempe kiel modelon la landon de la venkinta socialismo — USSR. La saman direktiĝon havis ankaŭ la serio de prelegoj, kiujn Botju faris en la abstinula societo kaj la filozofia rondo „N. Aleksiev“, kies prezidanto li estis. Li partoprenis aktive en la redaktado kaj eldonado de la laŭleĝa gimnazia ĵurnalo „Lâĉistruj“ (Radi-ŝpruco). Kun sia neelĉerpebla energio Botju trovadis tempon kaj fortojn partopreni aktive ankaŭ en la organizado de serio da ekskursoj kaj renkontiĝoj, en diversaj literaturaj kaj muzikaj programoj ks., per kio aparte

³ RMS — Laborista Junulara Unuiĝo (jun-komunista unuiĝo en Bulgario, tiutempe eksterleĝa).



fortikigis la vicojn de RMS. Li organizis progreseman bibliotekon, kies libroj estis kaŝe disvastigataj inter la lernantaro. La polico arestis kaj inkviziciis lin du tagojn por igi lin denunci la bibliotekon, tamen li nenion perfidis. Pro sia tuta agado, pro siaj altaj komunistaj ecoj li fariĝis amato de ĉiuj honestaj homoj en la gimnazio.

Botju agis aktive ankaŭ en sia naskiĝvilaĝo. Tie kun aliaj progresemaj junuloj li fondis abstinulan kaj kooperativan societojn, organizis renkontiĝojn, celebroy ks., ekzemple dediĉe al Ĥristo Botev, disvastigis kontraŭfaŝistajn alvokojn, kolektis monon kaj produktojn por eksterlegaj kamaradoj.

Fininte la gimnazion en 1941, en la aŭtuno de la sama jaro Botju fariĝis soldato en u. Nikopol. Tiutempe la perarmila kontraŭfaŝisma batalo kreskis pli kaj pli. Ankaŭ tie, en la kazerno, Botju manifestis kvalitojn de sperta kaj talenta junulara gvidanto kaj ne ĉesigis sian revolucionan agadon. Li rapide kontaktigis kun progresemaj junuloj en la kazerno kaj organizis kontraŭfaŝistan grupon, kiu provizis la partizanojn per municioj.

Sed hazarde okazis fiasko. Botju akceptis la tutan respondecon sur sin kaj por eviti areston je la 21 de aprilo 1942 kun fusilo enmane foriris por aliĝi al la partizana taĉmento. Pro la malbona vetero tamen, nekonante la lokojn kaj ne havante eblecon averti la nelegalajn kamaradojn pri sia fuĝo, post kvintaga vagado li estis denunciita kaj kaptita apud v. Trâncovica, distrikto de Pleven.

Inkviziciita laŭ plej kruela maniero en la kazerno, juĝita kaj kondamnita en Pleven je morto per pendigo, la 24-an de junio 1942 la sentima RMS-ano ekstaris antaŭ la pendigilo kun fiere levita kapo. Plena je kredo en la venko de la komunismo li respondis al la majoro, kiu ŝajnis sin indulgema:

— Mi konas vian indulgon! Sed memoru, ke unu homo nenion signifas, tamen post mi la miloj venkos!

Poste li turnis sin al la soldatoj kaj ekkriis:

— Mi mortas, ĉar mi amas mian popolon! Amu ĝin ankaŭ vi, kamaradoj soldatoj! Mi sentas min fieraj, ke mi pereas por la libero de la patrolando! Mi pereas por la justeco!

La soldatoj turnis kapojn por ne rigardi la tragikan pereon de sia ŝatata kamarado.

Tiel ĉesis bati la koro de la sentima junulo. Tiel finis sian mallongan, sed riĉenhavan vivon la arda juna komunisto, internaciisto, esperantisto, humanisto kaj kristale pura homo Botju Penev, testamentinte al la generacioj sian vivon-ekzemplon.

Lia heroaĵo estas senmortigita per tri monumentoj — en lia naskiĝvilaĝo, apud urbo Belene, kie li estas pendigita, kaj en urbo Sviŝtov. Pri li estas bone aranĝita muzeo en v. Dlâgnja, distrikto de Gabrovo, najbara pli granda vilaĝo ol Katrangii (dekstre de la vojo de Veliko Târnovo al Drjanovo). Inter la eksponitaj objektoj kaj dokumentoj el la vivo de Botju estas ankaŭ la E-leteroj de liaj eksterlandaj korespondantoj. Malgranda libro de Ljuben Kantarev en la serio „Niaj herooj“ skizas la vivon kaj la agadon de Botju Penev, rakontas pri lia granda amo al sia popolo kaj pri lia forta malamo al ĉiaj subpremantoj.

Lian nomon portas la lernejo kaj la popola legejo en lia naskiĝvilaĝo, la fundamenta lernejo en fervojstacio Sokolovo, multaj junpioniraj kaj komso-molaj organizaĵoj, lernejanaj laborbrigadoj, unu soldatbataliono, kie li militservis, k.m.a.

La nomo de Botju Penev restos por ĉiam en la analoj de la revoluciaj bataloj de nia popolo por libero, socialismo kaj feliĉo.

Dimitro Flaĝiev

LA GRANDA POPOLA KOLERO

700-jariĝo de la ribelo de Ivajlo — la unua kontraŭfeŭdula kamparana ribelo en Eŭropo

La bulgara mezepoko konas grandegajn politikajn sukcesojn, brilajn militvenkojn, neordinarajn kulturajn suprenirojn, sed la plej granda fiero por nia popolo rilate tiun epokon sendube estas la kontraŭfeŭdula ribelo, eksplodinta en 1277. Ĝin ĉefis la legenda kamparana gvidanto Ivajlo. La ribelo daŭris tri plenajn jarojn kaj elmilitis vicon da venkoj super la eksterlandaj invadintoj kaj la enlandaj subpremantoj.

Forpasis sep jarcentoj ekde la revolucia levigo de la popolaĵ amasoj, sed ankaŭ hodiaŭ ĝi konsternas nian imagon per la aŭdaco de la heroaĵo. Simile al neretenebla elemento la popola kolero forbalaas la dogmojn de la eklezio, deklarinta sankta, eterna kaj neŝancelebla la potencon de la caro kaj la boljaroj¹, liberigas de antaŭjuĝoj, plantitaj dum jarcentoj, la penson de la ordinara kamparano kaj ribeligas ilin kontraŭ la subpremantoj. Dum mallonga tempo el la ariĝintaj ĉirkaŭ Ivajlo liaj kunfratoj, armitaj per ajnaj armiloj, elkreskas batalkapabla armeo, kiu disbatas ne nur la boljarajn taĉmentojn, sed ankaŭ la armeon de caro Konstantin Asen kaj poste sukcese militas kontraŭ la teruraj tataroj kaj la spertaj pri la militarto bizancanoj.

El la verkoj de la bizancaj aŭtoroj, kiuj entenas informojn pri la ribelo de la bulgara kamparanaro, blovas nekaŝita malamo kaj orgojla malestimo al ĝia gvidanto, sed malgraŭ tio ili estas devigitaj fari amarajn rekonojn. Estas mirinde, kiel ne rompiĝis la ansera plumo de la altrangulo Pahimeris², kiam li skribis pri Ivajlo: „Ne pasis eĉ tago sen pligrandiĝo de la nombro de liaj adeptoj kaj sen lia distingigo per iu nova heroaĵo“ Kaj plue: „Liaj kuraĝaj bataloj estis sukcesaj. Tiuj, kiuj rezistis al lia elementa impeto, ne povis elteni.“ Same li atestas, ke la bravaj bizancanoj jam ne kuraĝis eniri en senperan batalon kun la „bravaj kaj aŭdacaj“ batalantoj de Ivajlo. Kaj fine grava en la malnovaj analoj estas la karakterizo de la nevidita ĝis tiam levigo de la polamasoj kiel „io granda“.

Atesto pri la obstineco de la batalo kontraŭ la invadintaj bizancanoj estas ankaŭ la fakto, ke la sama aŭtoro skribas pri sangoversaj bataloj, okazintaj apud la muroj de pli ol kvardek bulgaraj fortikaĵoj. Senduba estas la potenco de la ribelula armeo, se ĝi povis militi samtempe sur tri frontoj: kontraŭ la enlanda reakcio, kontraŭ la tataroj, kies sur-

prizatakojn la regantoj el Târnovo ne povis haltigi, kaj kontraŭ la bizancanoj, kiuj agis samtempe per kelkaj armeoj kontraŭ ili. En 1279 j. nur en daŭro de unu monato la soldatoj de Ivajlo povis neniigi senreste du multnombrajn por sia tempo bizancajn armeojn, unu el kiuj estris la bofilo de la bizanca imperiestro Miĥail la VIII Paleologos — la militestro Murinis.

En la persono de Ivajlo la ribelula armeo havas indan gvidanton kun evidentaj ecoj de ŝtataganto, militestro kaj homo.

La homa digno instigas Ivajlo'n forĵeti la proponon de la carino el Târnovo, la bizancanino Maria, kiu pro emo al la regpotenco ne hontas proponi sian manon kaj la tronon al la murdinto de sia edzo. Li respondas al ŝi: „Mi ne deziras, ke estu donacita al mi potenco, kiun mi ne elmilitis per miaj glavoj kaj armeo.“ Sed kiam la bizancaj armeoj minacas la bulgarajn limojn, la saĝo de ŝtataganto ekdominas kaj li donas sian konsenton, „por ke ne estu verŝata pli da sango en intercivitana batalo“.

La neatendita feliĉo ne fierigas la kamparan gvidanton. La ruza carino ne sukcesas impliki lin en siajn retojn, kiel ŝi estis farinta nur unu jaron antaŭe kun la reganto de la nordokcidentaj bulgaraj teritorioj la despoto Jakov Svetoslav, kiun ŝi invitis en Târnovo'n, adoptis lin, kvankam li estis pli aĝa ol ŝi, kaj poste, dum festeno je lia honoro, venenis lin. La tentoj de la kortego ne sukcesis deflankigi Ivajlon de la antaŭvidita vojo kiel verŝajne esperis la boljaroj de Târnovo. Kiam nova bizanca invado minacis la bulgaran landon, Ivajlo forlasas la ĉefurbon, zonas denove la glavon por resti ĝisfine fidela al la granda justeco, al kiu li estis dediĉinta sian tutan vivon.

Admirindaj estas la militestraj kvalitoj de Ivajlo, kiu scipovis en mallonga tempo organizi multnombrian ribelulan armeon, batali samtempe kontraŭ kelkaj malamikoj, agi rapide, kuraĝe kaj decide, donante surprizajn batojn al la kontraŭuloj. Liaj personaj militestraj ecoj estas atestataj de Pahimeris: „Tiam li faris multajn heroaĵojn, ĉar li batalis kun pasiega kuraĝo.“

La afero de Ivajlo daŭre vivis ankaŭ post lia morto. En 1294 j. en Konstantinopolo aperas iu bulgaro, kiu prezentis sin por la iama Ivajlo kaj proponas al la bizanca imperiestro Andronikos la II organizi militiron kontraŭ la turkoj, minacantaj la malgrandaziajn teritoriojn de Bizanco. La rakonto de

¹ *Nobeloj en mezepoka Bulgario*

² *Georgios Pahimeris (1242—1310)*



*La forto de la birdo estas en la
flugiloj, la forto de la homo —
en la amikeco.*

Kazaña proverbo

La renkontiĝo okazis en la ĉefurbo de floranta Kazaĥio — urbo Alma-Ata. La interparolo, tiel senpacience atendita de mi, okazis en vasta kabineto kun multaj librobre-



toj. Mi rigardis kun sento de nevola mirego la homon, kies neordinara biografio delonge altiris mian atenton — ĉu vere tiu junule aspektanta, modesta kaj eĉ iom ĝenema ĉe la

Paŝimeris estas neordinare elokventa kaj sincera: „Tuj kiam la bulgaro decidis entrepreni la militiron, al li komencis veni multe da homoj el proksimaj kaj malproksimaj lokoj. Ŝajnis, ke la universo mem kaj la tuta tero estis ekmoviĝintaj. Tiuj homoj, kiuj konis nenion alian krom agrikulturo kaj fosado aŭ scipovis nur konduki bovojn — homoj paŝistoj kaj kamparanoj, forlasadis siajn bienojn kaj armitaj per bastonegoj kunvenadis memvole. Soldatoj sen armiloj, ili formis sencordajn batalionojn, por kiuj la nomo de Laĥana (Ivajlo — noto de la aŭtoro) estis sufiĉa por gajni la venkon, kie ajn ili aperus. Tiamaniere en mallonga tempo ĉirkaŭ lin kolektiĝis nekalkulebla nombro de soldatoj.“

La kontraŭfeŭdula ribelo en 1277—1280 jaroj havis multjarcentan reĝon kaj montris la vojojn al la estonteco.

*El j. «Večerni novini», 17. 3. 1977
El la bulgara: D. H.*

unua rigardo homo havas la honoran titolon de merita aganto de la scienco, de doktoro de la veterinaraj sciencoj? Ĉu li estas partopreninto en multaj internaciaj kongresoj, simpozioj, konferencoj? Ĉu li gvidas plej viglan interŝanĝon de scienca literaturo kaj riĉenhava scienc esplora laboro kun helminologoj en Bulgario, Hungario, Pollando, Mongolio, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Usono, Britlando, Kanado, Nederlando, Svedio, Norvegio, Portugalio, Hispanio, Francio, GFR, Italio, Svislando kaj multaj aliaj landoj?

Sendube tio estis li — akademiano Sergej Nikolaeviĉ Boev, la renkontiĝon kun kiu mi tiel longe kaj obstine serĉis.

Ĉio ĉi komenciĝis jam en junio 1975, kiam mi, estante en Bulgario, kolektadis por mia libro materialon el la arkivoj kaj bibliotekoj de gastama Sofio. Renkontiĝante kun veteranoj de la Bulgara Komunista Partio kaj sindikata movado, mi ofte rememoris la kazaĥan proverbon, kiun mi ekŝatis ekde infanaĝo: „La forto de la birdo estas en la flugiloj, la forto de la homo — en la amikeco“.

Ankaŭ en la pasinteco mi renkontis gastamecon kaj malavaran fratan helpon flanke de la bulgaraj gekamaradoj. Ĉi-foje la kunlaborantoj de la Centra Konsilio de Sindikatoj faris absolute ĉion eblan kaj neeblan por helpi min en plej mallonga tempo trovi dokumentojn pri la internaciaj ligoj de la sindikatoj de Soveta Kazaĥio kaj Bulgario dum la 20—30-aj jaroj.

La rezultoj de la serĉado superis mian atendon. Estis trovitaj ege valoraj dokumentoj, kiuj konfirmas la intimajn amikajn ligojn inter la Kazaĥa Konsilio de la Sindikatoj (Kazsovprof) kun la Sendependaj Laboristaj Sindikatoj de Bulgario (NRPS) en la periodo de industriigo de la soveta lando, de kolektivigo de la agrikultura mastrumo kaj efektivigo de la kultura revolucio. Jam tiam la kazaĥaj sindikatoj kaj ties aktivuloj dividis kun siaj bulgaraj kolegoj la akiritajn spertojn, donis al ili ĉiuf flankan moralan kaj materialan helpon. Malgraŭ la kruela blanka teroro de la bulgara militista-faŝista reĝpotenco, el Sovetunio, inkluzive el Kazaĥio, en Bulgarion oni ricevis multajn leterojn, artikolojn, fotojn ka. dediĉitajn al la sukcesoj de la socialisma konstruado, al la novaj konstruobjektoj, al la movado de laboravangarduloj, al la disvolviĝo de amasa socialisma laborkonstruado.

Sed kiu senpere efektivigadis tiun ĉi internacian korespondadon? Kiu povus kompletigi la informojn de la arkivaj dokumentoj kaj konservitaj gazetoj kaj informoj el la 30-aj jaroj?

Pri tiu ĉi korespondado multon povus rakonti la gvidanto de la kulturfako kaj poste prezidanto de la Kazaha Konsilio de la Sindikatoj Torsun Ĝumabaev — membro de la Lenin-partio ekde 1919. Senpere kaj aktive partoprenis ĝin ankaŭ Ivan Fedotov — prezidanto de la sindikata klubo „Internacia Laborista Ligo“ en Alma-Ata. Sed li jam de longe ne estas inter la vivantoj. . .

Tute subite mi trafis enan anoncon aperigitan en la duonleĝa ĵurnalo „Mejdunaroden Rabselkor“¹ n-ro 16 de 16 de aŭgusto 1933:

„Kamaradoj! Helpu al junaj sovetaj laboristoj sur la scienca fronto ekposedi la burĝan sciencan!”

S. Boev. Alma-Ata. Kazahio. Meza Azio. Puŝkinskaja 43. Scienceplora Veterinara Instituto.“

Kaj sub tiu ĉi anonco estis noto de la redakcio, ke S. Boev deziras ricevi literaturon pri parazitologio en bulgara, angla kaj germana lingvoj kontraŭ sovetaj eldonaĵoj, bildkartoj, fotoj kaj ke li ŝatus korespondi pri demandoj ligitaj kun la helmintologio² kaj aliaj proksimaj temoj.

Tiu alvoko de S. Boev ege interesigis min.

Unue, V. I. Lenin parolis pri la neceso utiligi por la socialisma konstruado en nia lando la sciencajn kaj teknikajn atingaĵojn de la evoluintaj kapitalismaj landoj, speciale la spertojn en organizado de la laboro. La alvoko de la ĉiuna sciencisto starigis nome la celon pri utiligo de la atingoj en la kapitalismaj landoj.

Due, mi ekmemoris, ke en Alma-Ata vivas la granda sciencisto helmintologo Boev. . .

Ĉu tio ne estas la sama S. Boev, kiu publikigis la anoncon en „Mejdunaroden Rabselkor“? Per tia demando mi adresis min al la malnova bulgara ĵurnalistoj kaj redaktoro de multaj revoluciaj sindikataj eldonaĵoj dum la 30-aj jaroj Nikola Aleksiev. Li konfirmis, ke temas pri la sama Boev, kaj ke ĝuste Boev tiutempe sendadis korespondaĵojn por la revolucia gazetararo en Bulgario.

. . . Nia interparolo kun Sergej Nikolajevič Boev daŭris longe. La akademiano kun entuziasmo rakontis epizodojn ligitajn kun la komenco de lia laboragado, pri la jam tiam ekamitaj de li vastegaj kazahaj stepoj, pri eminentaj homoj en la respublikoj de Meza Azio. La vigla, emociplena kaj bildeca pa-

rolado de la sciencisto revivigis la unuajn paĝojn de lia laborbiografio, kiam la ĉiuna, sciama kaj ŝatanta sian laboron veterinaro ricevis lecionojn de la praktika vivo komence en Turkeŝtano (nun regiono Ĉikmentŝkaja de Kazaha SSR), poste en Poltorack — la nuna Aŝhabad — ĉefurbo de la Turkmena SSR.

La unuaj korespondaĵoj de Sergej Boev, kiuj altiris la atenton de la legantoj ne nur pro la aktiveco de la starigitaj demandoj, sed ankaŭ pro la pasia interesiĝo de ilia aŭtoro, aperis unufoje sur la paĝoj de la laboristaj E-ĵurnaloj jam en 1926 j. La eksterlanda laborista gazetararo volonte publikigas la materialojn de Boev, dediĉitajn al la vivo de la laborulo en la naciaj respublikoj de Soveta Oriento. Li tuŝis vivgravajn temojn kiel la agrar-akvan reformon, la kolektadon de monrimedoj helpe al strikantaj anglaj ministoj, la konstruadon de kotonpirlaboraj uzinoj, la ateisman propagandon. . .

Komence de la 20-aj jaroj la atento de la soveta popolo, de la vasta publiko en USSR estis direktita al la batalanta kontraŭ la faŝismo Bulgario. La laboruloj en la unua en la mondo socialisma lando donis grandegan moralan kaj materialan helpon al la bulgara proletaro. La registaro de Ljapčev, anstataŭinta la registaron de la faŝisto-ekzekutisto Cankov, daŭrigis la politikon de firmigo de la burĝa regpotenco, la persekutadon al la komunistoj. La studento Boev starigas ligan kun aktivaj membroj de BKP, troviĝantaj en profunda eksterleĝeco.

„ . . . La leterojn al Bulgario, — rememoras li, — oni devis sendi helpe de perantoj — proletaj esperantistoj el Germanio. E-tiuj lastaj plej grandan helpon donis al mi Werner Herzenbach (Verner Hercenbah), Jesef Bürger (Jezef Bjurger) kaj aliaj laboristoj — ĉiuj el Essen (Esen) — la plej revolucia regiono de proleta Germanio.“

La plej aktiva korespondantino de Boev estis Tinka Kolarova — Lakova, laboristino el teksa fabriko en Sliven, membro de BKP. La korespondado kun ŝi daŭris multjare. Ŝi sendis al Sergej Boev enhavoriĉajn informojn pri la revolucia movado en Bulgario.

Jam diplomita veterinara kuracisto S. N. Boev translokiĝis en urbon Alma-Ata. Es-ante aspiranto li daŭrigis sian korespondadon kun la bulgaraj geamikoj. Kune kun la aliaj sindikataj aktivuloj, membroj de la klubo „Internacia Laborista Ligo“, li rakontis al ili pri la konstruado de la Turkeŝtana — Siberia Fervojo (Turksib) kaj aliaj konstruobjektoj de la kvinjaraj planoj, pri la triumfo de la nacia Lenin-politiko en Kazahio, pri kulturaj ŝanĝoj en tiu postrestinta periferio de cara Rusio. Multon el tiu korespondado S. N. Boev uzis en sia plua esploralaboro. La novaj amikoj helpis lin ricevi ankaŭ scien-
can literaturon pri lia fako.

¹ Mejdunaroden Rabselkor (Internacia Laborista-Kampana Korespondanto)

² Helmintologio — scienco pri la parazitaj vermoj kaj pri la malsanoj, kiujn ili kaŭzas ĉe homo, bestoj kaj kreskaĵoj.



En 1933 j. Boev ekhavis skriban kontakton kun la redaktoro de la scienca gazeto „Internacia Veterinara Revuo“ — la veterinara kuracisto Georgi Popivanov (jam post la milito Sergej Nikolaeviĉ eksciis, ke li estis membro de la Bulgara Komunista Partio ekde 1926 j.). En la 30-aj jaroj la juna soveta sciencisto publikigis en tiu ĵurnalo kelkajn sciencajn artikolojn kaj referaĵojn de la katedro-estro de patologia anatomio ĉe la Zooveterinara Instituto de Alma-Ata B. P. Vsevolodov. Tio estis la unuaj sciencaj publikigoj de la sovetaj kazaĥiaj sciencistoj eksterlande. . .

Pasis jaroj. En septembro 1944 la bulgara popolo, intime unuiĝinta sub la standardo de la Patrolanda fronto, sub la gvido de la glora Komunista Partio kaj apogante sin je la heroaj venkoj de la Soveta Armeo, por ĉiam liberiĝis el la monarkofaŝisma jugo, starigis regpotencon de la laboruloj kaj ekmarŝis laŭ la vojo de konstruado de socialismo. En mallonga tempo la lando transformiĝis en socialisman ŝtaton kun alte evoluinta industrio kaj grandbiena mekanizita agrikulturo.

La bulgara-soveta amikeco estas la viva krea fonto de la grandegaj sukcesoj de la bulgara popolo en konstruado de disvolvita socialisma socio. Kaj la bulgara popolo memoras kaj alte taksas tiujn, kiuj starigis la fundamentojn de tiu kara amikeco. Inter tiuj rimarkindaj patriotoj oni juste povas nomi ankaŭ akademianon Boev.

Post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario la soveta sciencisto restarigis la ligojn kun siaj bulgaraj korespondintoj rompitaĵoj dum la jaroj de la dua mondmilito. Aparte ĝojiga estis la restarigo de la korespondado kun Tinka Lakova kaj Georgi Popivanov (kun tiu lasta li interŝanĝas sciencajn literaturon).

En 1966 j. Sergej Nikolajeviĉ estis gasto de la bulgaraj sciencistoj. La estro de la Veterinara Administracio ĉe la Ministerio de Agrikulturo de Bulgario Popov donis al li por elprovi en Sovetunio la kontraŭhelmintan preparaĵon triabendazolo por profilaktiko kontraŭ la danĝera malsano de la cerbo ĉe iuj cervospecoj. Siavice Boev dividis kun la bulgaraj kolegoj sian riĉan sperton en la helmintologio. Gazeto „Bulgara Esperantisto“ (n-ro 2, 1967) skribis, ke S. N. Boev estas malnova amiko de la bulgara popolo.

La intimaj sciencaj ligoj de Sergej Nikolaeviĉ kun la bulgaraj sciencistoj fortiĝas

kaj profundiĝas. La gvidata de li helmintologia laboratorio de la instituto de zoologio ĉe la Akademio de Sciencoj de Kazaĥa SSR, fondita en 1947 j. laŭ propono de la elstara sciencisto akademiano K. I. Skrjabin³, fariĝis unu el la elstaraj centroj de la soveta helmintologio.

Sub la gvido de S. N. Boev la laboratorio atingis grandajn sukcesojn en esplorado pri la faŭno, sistemigo kaj disvastigo de la helmintoj ĉe domaj kaj sovaĝaj mambestoj, en esplorado pri la plej danĝeraj helmintoj (malsanoj kaŭzitaj de helmintoj) ĉe la vilaĝmastrumaj bestoj, aparte ĉe la ŝafoj, kaj pri la rimedoj por ties kuracado kaj averto kaj ĉum la lastaj du jardekoj — en la teoria studo de problemoj pri la naturaj centroj de disvastiĝo de helmintoj ĉe homo kaj bestoj. Al la plumo de akademiano Boev apartenas 159 sciencaj verkoj, inter kiuj 8 monografioj, ankaŭ 38 sciencopopularaj verkoj. Nur la aplikita en Kazaĥio metodo de libera nutrado de ŝafoj per salo entenanta la kontraŭhelmintan rimedon fenotiazono (aŭtoro S. N. Boev) donis ekonomian efekton de 50 milionoj da rubloj por la periodo 1966—1970 j.

Kun grandega entuziasmo la kolektivo de la laboratorio, gvidata de akad. Boev, renkontis la XXV kongreson de la Komunista Partio de Sovetunio. Responde al la alvoko de KPSU kaj la soveta registaro — ĉiuflanke disvolvi la ŝafbredadon en Kazaĥio — la kunlaborantoj de la laboratorio metis en sian esplorplanon por la deka jarkvino la temon pri helmintoj ĉe la ŝafoj.

Sergej Nikolaeviĉ estas certa, ke la solvo de tiu ĉi problemo donos nemalgrandan utilon ankaŭ por NR Bulgario kaj la ceteraj frataj socialismaj landoj. Ĉar kiaj ajn problemoj aperus antaŭ ili, ripetas akademiano Boev la vortojn de L. I. Breĵnev en la XXV kongreso de KPSU, oni devas solvi ilin en spirito de plua firmigo de la amikeco, unueco kaj kunlaboro.

Oni ne devas dubi, ke akademiano Boev kaj liaj kunlaborantoj solvos kun honoro la taskojn, kiujn la nova kvinjara plano starigis antaŭ la laboratorio.

*Josif L. Portnoj, Karaganda, USSR
El la rusa: Kunĉo Vălev*

³ K. I. Skrjabin faris multon por la progreso de la helmintologio ne nur en USSR, sed ankaŭ en Bulgario, kiun li vizitis en 1936 kaj 1952 j.

LA TENDARLERNEIO EN DRUĴEVO VIN VOKAS!

La Esperanta tendarlernejo apud v. Druĵevo en la Balkanmontaro estas plene renovigita, kun televidaparato, banejo kun varma akvo ktp. Venu lerni Esperanton, venu ripozi, venu ĝui la belaĵojn de la monto kaj agrablan E-medion en Druĵevo!

La unuaj tri grupoj jam estas plenaj (ekde la 10 de junio). Liberaj lokoj estas nur en la kvara grupo (26. VII — 8. VIII) kaj en la kvina (10 — 23 de aŭgusto). Dusemajna restado — nur 25 levojn! Detalaj informojn petu de la *Distrikta Estraro de BEA, bul. Ĥr. Botev 97, 1303 Sofio.*



Komence de tiu ĉi jaro prof. P. Ariste estis en Svedio. S-ano Geoffrey Sulton ricevis de li intervjuon, kiu aperis en n-ro 2/1977 de „Espero“ — organo de la Sveda Esperanto-Asocio. Ĉi-sube ni publikigas la tutan intervjuon kune kun la enkondukaj vortoj de la redakcio de „Espero“.

Fine de januaro venis al Uppsala prof. d-ro Paul Ariste, profesoro pri finna-ugraj lingvoj ĉe la universitato de Tartu en Estonio, por prelegi dum du semajnoj ĉe la universitato. Prof. Ariste estas monde konata en sia fako, membro de la Estona Akademio de Sciencoj, honora membro de la sciencaj akademioj de Finnlando kaj Hungario, ano de la redakta komitato de La Monda Lingvo-Problemo kaj membro de Akademio de Esperanto. Esperantistoj plurfoje renkontis lin dum lia vizito kaj intervjuis lin por „La Espero“.

NI DEVAS HAVI TRE MULTAJN KAJ TRE FORTAJN PERSONAJN KONTAKTOJN



— Mi kredas, ke en neniuj elementa lernejo, sed en tre diversaj mezlernejoj, ekzemple en Tallinn en la deka mezlernejo — ili estas laŭ numeroj ĉe ni — tie Esperanto estas kiel fako. Oni povas lerni ĝin kiel fremdan lingvon — kaj mi scias, ke en Riga oni ĝin instruas, ankaŭ en aliaj lernejoj en Latvio, kaj en diversaj aliaj partoj de Sovetunio. Sed plejparte ĝi estas nedeviga fremda lingvo. Oni aranĝas kursojn.

— Ĉu en Tallinn ĝi estas deviga?

— En kelkaj klasoj ĝi estas deviga, jes. Se oni eklernis, oni devas daŭrigi.

Por instrui la lingvon oni nun devas ricevi oficialan atestilon pri kompetenteco kaj mi, kun du universitataj kolegoj, faras ĉi tiujn ekzamenojn en la universitato.

— Ĉu la ŝtato donas iom da ekstra salajro al homoj, kiuj scipovas Esperanton?

— Estas kelkaj tiaj profesoroj, kie oni bezonas fremdan lingvon — kaj oni povas ricevi pli da salajro por kono de ĝis tri lingvoj — por kvar aŭ kvin ne plu. Kaj unu el ili povas esti Esperanto — en dogano, restoracioj, bibliotekoj ktp.

— Sed ĉi tio verŝajne ne aparte allogas homojn lerni la Internacian Lingvon?

— Ne, sed mi tamen scias, ke kelkaj venis al kursoj por havi Esperanton kiel trian lingvon.

La estona eldonejo „Eesti Raamat“ regule eldonas altkvalitajn librojn en Esperanto.

— Ĉu vi scias pri la estonta agado de la eldonejo sur tiu ĉi kampo?

— Jes, ĝi ankaŭ tiel daŭre eldonos en la estonteco. Ĉi-jare devas aperi sufiĉe dika libro de estona poezio. Estas ĉirkaŭ sesdek aŭtoroj tradukitaj de Hilda Dresen.

— Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la organizo kaj konsisto de la Esperanto-movado en Estonio?

— En Estonio estas lokaj organizaĵoj. En Tartu estas klubo esperantista. Ĝi ne estas tre forta, sed oni aranĝas ankaŭ kursojn por urbanoj. En Tallinn la organizaĵo estas tre forta. Estas multaj membroj, ili havas kursojn, programvesperojn, referaĵojn ktp. Tut-

— Kiam vi lernis Esperanton?

— Mi estis 14-jara, kiam mi komencis. Mi havis esperantistajn konatojn pli aĝajn ol mi kaj tiel interesigis. Kiel 15-jara mi jam ĝin sufiĉe bone konis kaj kiel 16-jara mi skribis mian unuan lingvan skribaĵon en Esperanto, kiu temis pri la liva popolo (La livoj en „Esperanto Tiumfonta“, Kolonio, 1921).

— Kaj ĉu vi mem aktivis en la Esperanto-movado nun?

— Mi foje estis sufiĉe aktiva, sed nur lastatempe malpli. Ankoraŭ antaŭ dek jaroj mi instruis ĝin en la universitato en Tartu. Multaj studentoj tiam ĝin lernis. Nun mi estas aktiva nur kiel ekzamenisto. Sed mi skribadas Esperante por gazetoj kaj simile kaj ankaŭ pri Esperanto.

— Ĉu vi povas diri, en kiuj universitatoj kaj lernejoj oni instruas Esperanton en Sovetunio?



landan organizaĵon ni ne havas, sed lokajn. Kaj en aliaj respublikoj en Sovetunio estas same.

— Ĉu ekzistas tutuniaj kontaktoj inter la esperantistoj de Sovetunio?

— Jes ili estas fortaj. Ĉiusomere oni aranĝas tiel nomatajn tendarojn en tre diversaj lokoj, sed ne samtempe. En kelkaj tendaroj estas ĝis 500 partoprenantoj, kaj tie oni havas sencajn prelegojn. Ĉiu tendaro havas sian specialan programtempon. La tendaroj daŭras proksimume unu semajnon. Oni povus nomi ilin ankaŭ someraj universitatoj.

— Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la nove komencita interlingvistika agado de Soveta Akademio de Sciencoj?

— Ĝi estas sufiĉe forta, tamen bedaŭrinde mortis profesoro Bokarev, la koro kaj la kapo de la tuta movado, sed oni daŭrigas tie. Oni invitis min antaŭ nelonge veturi tien por prelegi, kaj oni kunvenas regule tie kaj

esploras la demandon pri lingvo internacia; ne nur Esperanton, sed centre tamen estas Esperanto.

— Ĉu oni en antaŭvidebla estonteco povos fondi soveta Esperanto-organizaĵon?

— Mi ne scias, ĉu oni organizos, sed tio dependas de financoj. Se la ŝtato havos financojn, oni faros tion.

— Kiamaniere la svedaj esperantistoj povas kunlabori konstruktive kun vi en Sovetunio?

— Antaŭ ĉio oni devas havi tre multajn kaj fortajn personajn kontaktojn kaj koni ĉion, kio aperas ĉe ni, same kiel ni volas konatiĝi kun ĉio, kio estas eldonita ĉe vi. Sed mi opinias, ke oni ankaŭ povas aranĝi somerajn ekskursojn: svedaj esperantistoj veturas ekzemple al Tallinn por renkontiĝi kun tieaj esperantistoj.

— Koran dankon!

Niaj amikoj skribas

Al la redakcio de «Bulgara Esperantisto»

Al la redakcio de «Internacia Agrikultura Bulteno»

Al la prezidanto de la Konsilantaro de Sovetia Esperantista Junulara Movado

Invitite de la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado k-do Nikola Aleksiev, de la Bulgara E-Asocio kaj de Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj, mi gastis en frata Bulgario de la 7 de septembro ĝis la 15 de oktobro 1976. Ĉie en urboj kaj vilaĝoj mi sentis neforgeseblan akcepton kaj ĉiuflankan helpon por konatiĝi kun la heroa historio de la popolo kaj kun ĝiaj nuntempaj vidindaĵoj kaj sukcesoj, ankaŭ helpon por mia lekciado. Sen troigo mi povas diri, ke ĉiun tagon estis eventoj, faktoj, signoj de sincera estimo kaj granda amikeco al la soveta popolo.

Je memoro de tiuj ĉi neforgeseblaj tagoj, reveninte en la patrolandon mi establis fondu-

son de 100 rubloj, kiu estos elspezata por amikaj internaciaj kontaktoj kun esperantistoj-eks'erlandanoj kun la celo kontribui por la internacia amikeco kaj paco.

Reveninte hejmen mi post eta paŭzo forveturis al Norda Kaŭkazo por kolekti semojn de la kuraca planto hipofeo. La naturaj kondiĉoj de Kaŭkazo estas similaj al la bulgara.

Rezulte mi sendis tiajn semojn al la prezidanto de la Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE) por senpaga dissendado al distriktaj E-societoj, por ke ili havigu ĝin al esperantistoj, kiuj estas amatoroj-hortikulturistoj.

Krome: mi donacis 20 rublojn por helpi finance al „Internacia Agrikultura Bulteno“ (redaktoro Ŝterju Kukuŝev, str. Oboriŝte 15, Peŝtera) kaj 12 rublojn al la Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM) por la supre menciitaj celoj.

Prezidanto de la Sovetia Sekcio de Veterana E-Klubo:

S. KRAJNOV

BONVENIGAS BULGARIO

Iam ie oni diris: „Nenio povas esti komparata kun la vojaĝado por pligrandigi la menson“. Dum la milito mi vizitis la kontinentojn de Norda Ameriko kaj Azio. Post mia esperantistiĝo en 1969 mi vizitis Danlandon, Aŭstrujon kaj nun Bulgarijon. En tiu lasta esperantisto diris al mi: Ĉu vi antaŭe kredis, ke estus permesata vagadi tra nia lando laŭplezure? “

Ricevinte tri invitojn de ege gastamaj bulgaraj esperantistoj, mi finfine decidis akcepti. Kiril Kalĉev kaj Vasil Mitovski renkontis min en Varna. Kiril veturigis min al sia hejmurbo Loveĉ. Poste mi gastis ĉe Vasil en

Trojan. Laste mi vizitis Ŝopov en Târgoviște. Dektri sunoriĉaj tagoj, plenplenaj je granda amikeco, belegaj spertoj en la balkanmontaro — Stara Planina — kaj multaj bongustaj bulgaraj pladoj! Ĉu vi iam gustumis pladon el tri grandaj paprikoj (du ruĝaj kaj unu verda), farĉitaj per pecetigitaj viando, pizoj kaj rizo, kun salato el tomatoj kaj paprikoj tranĉitaj? Super la farĉitajn paprikojn verŝu kvar kuletojn da natura jahurto. Paradizo surtera! Mi ne mencias aliajn pladojn en Bulgario — provu mem. Estos vivsperto neforgesebla!

¹ Pladoj — en senco de manĝaĵoj.

En Loveĉ Kiril Kalĉev, fervora instruisto en la E-klubo, kaj Asen Matev, ĉarma prezidanto de la distrikta estraro, proponis prelegon. Ĉeestis ĉ. 80 personoj — esperantistoj, gejunuloj, urbanoj. Mi montris kvardekon da grandformataj lumbildoj pri belajoj de Britujo. Asen Matev traŭis post ĉiuj tri frazoj por helpi al la komanantaj gejunuloj. Je la fino mi ricevis forajn salutojn kaj la kluba prezidanto Peĉo Vlaĥov donacis al mi helruĝan tablotukon en nacia stilo.

Vasil kaj mi marŝis dum horoj tra la montaro. La regiono inter Loveĉ kaj Trojan, kaj iom sude, estas rave bela. Se mi ĉevas fari komaron, imagu kompton de Skotlando sude de Edinburgo kaj de centra Kimrujo. Vizitinte restoracion, Vasil kaj mi luncis. La restoraciestro estis agrable impresita, ke mi elektis tiun bulĝeran pladon. Poste li donacis al mi du sekigitajn edelvejsojn de sur loka monto, bulĝarlingve nomata „Kozja Stena“ (Kaprina Muro). Farante tiun komplezon li ĉiris, ke edelvejso estas nur tie, ankaŭ en la montaro Rila kaj en la Altaj Alpoj.

Kun Vasil mi vizitis vilaĝon Borima, 22 kilometrojn for de Trojan. En ĝi estas 400 familioj, 2000 loĝantoj kaj 44 esperantistoj. En la Epseranto-Parko, 2 kilometrojn for, ni tranoktis en duetaĝa Esperanto-Domo, konstruita de la esperantistoj mem.

Tiuvespere en la apuda trinkejo de o da esperantistoj gastigis nin. Ni sidis ĉe longa tablo, manĝis fumigitan kolbason kaj malsekigis la gorgojn per tre bongusta bulĝara biero el sentenilaj potaĵpotetoj. Poste ni bone manĝis vinon kun salato, kun pli da biero. Mi proponis toston: „Por la estonteco de Bulgario! . . .“ „Kaj por la paco!“ — iu aldonis. La lasta tosto estis: „Por amikaro ĝis la lasta inter ni mortos!“ Apud mi sidis Stanĉev. Li estas arbaristo kaj amegis Esperanton dum 45 jaroj. Stanĉo kaj mi iĝis kiel sangfratoj — tiel bone ni interrilatis. Esperanto estas vivo por Stanĉo!

Mi vidis Danubon, ankaŭ Ruse. Stojan Ŝopov tagvojaĝigis min propra-aŭte kun sia ĉarma edzino. En Târgoviște, la loĝurbo de Stojan, kiel en Loveĉ kaj Trojan, mi renkontis multe da esperantistoj surstrate. Dum eliro el magazeno mi aŭdis saluton en Esperanto. Antaŭ mi ekstaris juna sinjorino. Vidante mian verdan stelon ŝi ne povis ne alparoli min esperantlingve. Kaj kiel ŝi surpriziĝis eksciinte, ke mi devenas el Anglujo, eĉ pli. . . el Chester, kie loĝas ŝia leteramiko Derek Ray! . . . Malgranda estas la mondo . . . precipe per Esperanto!

Adrian Oates

Verdaj steloj

Petja Bobev

FABELO PRI LA NAJTINGALO

Eksilentinte la tuta arbaro aŭskultis la Najtingalon, kiu kantis ekzalte, kaŝita en la verda foliaro. Aŭskultis arboj kaj arbustoj, birdoj kaj bestoj. Ĉu kanto estis tio aŭ rekte sorĉo! Nur la klara torenteto provis akompani lin per sia tenera murmuro. Kaj sube, surtere, sub la kunplektigitaj branĉetoj de la Sovaga Rozujo, sin kaŝis nesto, en kiu la Najtingalino kovis siajn ovetojn, enrevigita de lia mirinda kanto.

Subite la kantisto eksilentis timigita. Vid-al-vide, sur la supron de la Sovaga Rozujo, eksidis la Akcipitro kaj fiksas al li okulojn, kiuj fulmis avide super la raba hokforma beko. Ho! Li estis terura — tiu nesatigebla murdisto. Kiom da birdoj pereis en ĝiaj senindulgaj ungoj!

En la momento la Akcipitro forflugis ien. Kun sopiro de faciligo la Najtingalo intencis denove ekkanti.

Tiam la Sovaga Pirujo elgrincis malĝoje per siaj branĉoj:

— Mi petas vin, helpu al mi! Miloĝ da aviduloj rodas miajn foliojn. Purigu min de ili! Ekde kiam la Akcipitro elektis min kiel sian observejon, neniun birdon kuraĝas aperi ĉi tie. Jen tiel, pro nenio mi pereas!

Kiu kantas, malbonon ne pensas. Bonan koron havis la Najtingalo. Li ĉirkaŭrigardis singardeme, poste ekflugis al la alta Pirujo.

Bekfrapis unu larvon. Bekfrapis alian. La Pirujo kontente susuris per folioj.

Subite elsupre jetis sin la Akcipitro.



Konsternita pro timo, la Najtingalo kurbeflugis maldekstren, dekstren, supren, sed vane — la rabobirdo atingis lin kun triumfanta krio:

— Jen mi kaptos vin finfine!

Jam ne estis alia solvo: la Najtingalo ekflugis rekte malsupren kiel falanta ŝtono. Sed ĉe la tero, apenaŭ tuŝinte la sekan foliaron, li sagosimile ekflugis denove supren kaj — prr, prr! — rapide ŝovis sin en la Sovagan Rozujon. Enlogita de la persekutado kaj ege pli peza ol la Najtingalo, la Akcipitro ne sukcesis deteni sin kaj peze falis sur la teron.

T-u-u-up!

Li transkapiĝis unu-du fojojn, ekflirtis senhelpe kaj provis forflugi. Sed duonsvena pro la frapo, embarasita, li puŝis sin je la Dikan Pirujon. Kaj la Pirujo, atendante nur tion, eksvingis siajn pikilojn kaj gratvundis ĝin kruele.

— Jen, tion ĉi vi meritas! — fleksiĝis pro ridego la Pirujo. — Ni vidos, ĉu alifoje vi atakos miajn amikojn!

Finfine, sangoŝprucita kaj distirita, la Akcipitro flugis for.

Kaj ĝin oni ne plu vidis.

La tuta arbaro vigliĝis, la birdoj ekantis ĝoje.

— Mi tre dankas vin, — ekpepis la Najtingalo ordigante siajn plumetojn. — Vi savis min de la malfeliĉo!

La Dika Pirujo ekflustris mallaŭte per folioj:

— Bonon pro bono, amiko!

La Najtingalo denove pretiĝis sur sia ŝatata loko, kaj kvazaŭ nenio estis okazinta, li daŭrigis sian sonorantan kanton.

El la bulgara: Genka Banĉeva

PRI LA LINGVOJ EN BULGARIO

En n-ro 2/1977 de revuo „Espero“ — organo de Sveda Esperanto-Asocio, aperis interesa ankaŭ por niaj legantoj noteto, kiun ni publikigas la tutan ĉi-sube:

Unu el la plej parolataj lingvoj

En broŝuro/revuo, kiun la bulgara turisma oficejo en Stokholmo distribuas, troviĝas ankaŭ informo pri la lingvoj en Bulgario. Ni tradukas la koncernan pecon el la angla:

„La oficiala lingvo de Popola Respubliko Bulgario estas la bulgara (kiu apartenas al la grupo de slavaj lingvoj). Tamen, tre multaj bulgaroj povas konversacii en aliaj lingvoj, el kiuj la ĉefaj estas la rusa, la angla, la germana, la franca, la itala kaj Esperanto.“

Tio prezentas favoran perspektivon al ĉiuj, kiuj jam povas plani sian venontjaran libertempon en la lando de la Universala Kongreso 1978 — en Varna.

Asen Grigorov en kartvela lingvo

Ĵurnalo „Kutaisi“, eldonata en kartvela lingvo en u. Kutaisi, Kartvela SSR, en sia numero de 27/1977 j., aperigas la versaĵon „Julio 1975“ de nia konata poeto Asen Grigorov. La tradukon faris Hristina Kaĝaja kunlabore kun la poeto Zurab Kuĥianidze.

La versaĵon apudigas portreto de la aŭtoro kaj kelklinia informo pri lia verkaro kaj kunlaboro kun la Internacia Klubo ĉe la Palaco de Junpioniroj en la urbo. Krome estas longa artikolo pri la agado de tiu klubo pere de Esperanto, en kiu oni aldone legas pri Asen Grigorov.

PROponu LA PLEJ KONVENAJN E-EKVIVALENTOJN!

En n-ro 5 ni donis la unuan taskon al la kolektiva saĝo de la bulgaraj esperantistoj (Vidu ankoraŭfoje la enkondukan klarigon tie!).

Jen novaj vortoj, pri kies plej bona traduko oni klopodu. Ni atendas viajn proponojn. La plej trafaj aperos en „BE“. Sendu ilin ĝis unu monato post la apero de tiu ĉi numero.

добивна промишленост
преработвателна промишленост
капитални вложения
мека оран
феодал
васал
дегустация
парк (автомобилен, трамваен)
реамационен
при това
сервиз (автосервиз)
оспорвам си
интерниор

шип (медицински)
камерен състав
балетен състав
рейс
юноша
управление на автомобил
военно съединение
светофар
кухненски бокс
ансамбъл (архитектурен)
туристическа база
„Да беше останал още малко. . .“

С ЕСПЕРАНТО В ПОЛША И УНГАРИЯ

През 1977 г. продължава да функционира самолетно-автобусната есперантска линия „България—Полша“. Освен това Полша ще може да се посети и с влак. Унгария може да се посети с влак и автобус.

Записвания и подробности при ОР на БЕС гр. Смолян — пощ. кутия 30 или тел. 40—51, 52—97 и 27—54. За телеграми: „Смолян — есперанто“.

Ето накратко програмата за посещения в Полша и Унгария:

I. Полша

Група №	София — Варшава	Почивен център	Варшава — София	Почивен център и други градове, които ще бъдат посещавани
------------	--------------------	----------------	--------------------	--

А. Със самолет и автобус

1.	1—2 юли	2—7 юли	8 юли	ШВИЕЦИЕ, Хелмно, Груджиадж, Бидгощч, Гданск
2.	8—9 юли	9—14 юли	15 юли	ЯНИКОВО, Иновроцлав, Крушвица, Стжелно, Бидгощч, Познан
3.	15—16 юли	16—21 юли	22 юли	ЯНИКОВО „
4.	22—23 юли	23—28 юли	29 юли	ТУЧНО „
5.	29—30 юли	30.7—4.8	5 авг.	ХЕЛМИЦА, Торун, Циехоцинек, Вроцлавек
6.	5—6 авг.	6—11 авг.	12 авг.	„
7.	12—13 авг.	13—18 авг.	19 авг.	„
8.	19—20 авг.	20—25 авг.	26 авг.	„

Б. С влак и автобус

9.	13—15 юни	15—21 юни	22—24 юни	ТЛЕН, Бидгощч, Гданск, Сопот, Гдиня
10.	20—22 юни	22—28 юни	29.6—1.7	„
11.	17—19 юни	19—25 юни	26—28 юни	ФУНКА, Бидгощч, Гданск, Гдиня, Сопот
12.	24—26 юни	26.6—2.7	3—5 юли	„
13.	12—14 авг.	14—20 авг.	21—23 авг.	„
14.	19—21 авг.	21—27 авг.	28—30 авг.	„
15.	24—26 ноем.	26.11—4.12	4—6 дек.	БИДГОЩЧ, Закопане, Торун, Катовице

Пояснения: Групи № 1 и 2 са за средношколци, групи 3 и 4 — за пионери, а останалите — за различни възрасти. Таксата за групите със самолет е 200 лв., а с влак — 150 лв. Джобни пари в злота — до 250 лв. Групите са от по 20 есперантисти. Документите се уреждат по окръзи индивидуално.

II. Унгария

Група	София — Будапеща	Будапеща	Будапеща — София	З а б е л е ж к а
1.	15—16 авг.	16—21 авг.	21—23 авг.	С влак Белград—Букурещ
2.	15—16 авг.	16—21 авг.	21—23 авг.	С влак през Букурещ
3.	14—16 авг.	16—21 авг.	22—24 авг.	С автобус Белград—Букурещ
4.	27—28 дек.	28. 12—2.1	2—4 януари	С влак Белград—Букурещ
5.	27—28 дек.	28. 12—2.1	2—4 януари	С влак през Букурещ

Пояснения: Таксата за влак и автобус през Белград и Букурещ е 160 лв., само през Букурещ — 150 лв.

Записване — 45 дни предварително с преведени суми.